

PREZO: 1.- Kr.



MALGRANDA

N:RO 1 **REVUO** 1945

3 a JARO

ENHAVO:

	Paĝo
INFORME	1
DIO AŬ DIABLO? De Stellan Engholm	2
DIPLOMATIA LINGVO EN SVEDUJO, de profesoro Nils Ahnlund	7
PACMOVADO KAJ NunTEMPO, de P. Th. Justesen	15
VIVO EN AŬSTRALIO, de C. J. Caldera	18
ESPERANTO EN LA TELEFONTEKNIKO, de Åke Käell	23
KIA ESTOS LA ESTONTECO? de E. Hult	25
LITERATURO	29

Redaktoro — Eldonanto:

STELLAN ENGHOLM, LUDVIKA, SVEDUJO

Informe

Por duona jaro mi devis prokrasti la eldonadon de Malgranda Revuo. Ne estis eble sendi ĝin al eksterlando, kaj la vendo en Svedujo kovris por la lasta numero en 1944 nur trionon de la elspezoj. La ĝisnunaj mendoj el eksterlando kaj la supozata vendo en Svedujo ankoraŭ ne sufiĉos por kovri la netajn kostojn. Malgraŭ tio mi nun provas daŭrigi.

La programon de la revuo mi ne ripetos tie ĉi. Antaŭaj legantoj jam konas ĝin, novaj povas trovi ĝin en la unua numero, kiu ankoraŭ estas havebla. Espereble ankaŭ tiu ĉi numero iom montras la celadon.

En espero, ke daŭrigo estos ebla, mi danke akceptos artikolojn el la diversaj landoj, kiujn la revuo atingos. Por artikoloj, kiuj aperos, mi pagos.

La nemultaj abonantoj, kiuj jam pagis por 1945, kompreneble ricevos tiom da numeroj, por kiom ili pagis. Se daŭrigo montriĝos ne ebla, ili rericevos restantan monon.

Ludvika 15. 8. 1945.

La eldonanto.

Homoj malkaŝis ankoraŭ unu sekreton de la naturo. Per la gajnita scio ili kreis detruilon kun kosma forto. Ili faligis ĝin sur urbon, kaj dek kvadratkilometrojn kun domoj kaj homoj fariĝis polvo.

La homaro pli ĉagreniĝis ol ekĝojis pro la novaĵo. Certe ne estis kaŭzo por ĝojo. Ĉu vi memoras la impreson de la granda tertremo, kiu detruis grandajn partojn de Tokio? Tiu ĉi detruo estis multe pli granda.

Tamen malmultaj atentis unualoke pri la estingitaj homvivoj kaj la detruita urbo. Por momento la penskabablo de la homoj ekfunkciis. Se la dio de fulmotondro sendas sian fajron sur la najbaron, li povas sendi ĝin ankaŭ sur min. Se oni tiel detruas unu urbon, oni povas detruo ankaŭ aliajn. Se malgranda bombo faras polvon el urbego, kontentige grandaj kaj multaj faros polvon el la tuta tero.

En momenta klarvido pli intensa ol ordinare demandis sin la homaro kiel uzos sian potencon tiuj malmultaj, kiuj majstras regnojn kaj kosmajn fortojn. La simplaj homoj dum la tuta historio de homaj socioj same demandis sin, kiel uzos sian potencon tiuj, kiuj regas popolojn kaj majstras fortojn pli grandajn, ol estas tiuj de ordinara homo. Sed neniam la demando estis tiel grava kiel nun.

Kiel naivaj legendoj el la idilia infanaĝo de la homaro ŝajnas nun la instruoj pri justo kaj spirita vivo. Jesuo instruis, ke ni amu ĉiujn homojn kiel nin mem, se iu agas malbone al ni, ni tamen agu bone al li, peko estas ne nur malbonaj agoj sed ankaŭ malbonaj vortoj, pensoj kaj deziroj.

Tiaj diroj sonas pli ol naive en tempo, kiam mortigado estas plej praktika maniero por atingi sian celon, kiam estingo de centmiloj da senkulpaj homvivoj estas demando sole pri plej praktika maniero atingi bonan rezulton. Ĉiuj bombadoj estas faritaj "kun bona rezulto".

Kaj tiu homo ne nur instruis tiel. Kiam atakis lin liaj malamikoj, li eĉ rifuzis defendi sin. Per sia morto li konfir-

mis, ke lia instruo estas ne nur vortoj. La nuntempa prijuĝo de la tuta homaro pri tia homo povas esti nur unu kaj unuanima.

La instruoj pri interhoma respekto kaj bonagado fariĝis legendoj, fabeloj por infanoj. Dio kaj diablo apartenas al la superstiĉoj de la pratempo. Homo estas majstro de la universo. Li jam povas detruo laŭ kosma skalo, kaj iun tagon li eble ankaŭ povos krei vivon el senviva materio. Tiam la homa agado fariĝos plene racia. Por atingi siajn celojn oni povos en plej praktika maniero kaj mortigi kaj krei novan vivon.

Iu homo iam diris, ke la homoj kreis Dion laŭ si mem. Unue la aserto ŝajnis blasfema, poste oni akceptis ĝin, fine ĝi fariĝis seninteresa.

La aserto estas prava. Niaj komprenpovo kaj perceptopovo estas limigitaj. Kiam homo provas fari al si imagon pri nekonataĵo, li havas kiel materialon nur tion, kion li perceptas en la mondo ĉirkaŭ si, kaj kio denaske troviĝas en li mem.

Sed el tiu aserto sekvas ion, kion oni pretervidis. Tiuj trajtoj kaj ecoj, kiujn la homoj donis al siaj imagoj pri Dio, troviĝis en ili mem, troviĝis ĉe la religifondantoj kaj profetoj kaj pli malpli ĉe ĉiuj, kiuj akceptis kaj ŝatis tiujn imagojn. En ili troviĝis tiu justo, tiuj veramo kaj homamo, tiu sopiro al perfekta vivostato, kiujn ili esprimis per sia imago pri Dio. Ilia imago pri Dio estis bildo de ilia propra animo. En ili mem, en la adorantaj homoj, troviĝis la dieco. Kiu nuntempe havas tian spiritostaton, ke li povus krei tian bildon de ĝi, kian kreis la izraelaj profetoj kaj Jesuo aŭ la sendia Budho?

Se la homoj kreis Dion laŭ si mem, ili ankaŭ, kiel rimarkigas Ivan Karamazov, kreis la diablon laŭ si mem. Same kiel en la antaŭa kazo ili povis ĉerpi materialon por la bildo nur el tio, kion ili perceptis en la mondo ĉirkaŭ si kaj kio denaske troviĝis en ili. La diablo estas bildo de trajtoj kaj ecoj en la homaj animoj.

Dio kaj diablo — jen la homo. La iamajn imagojn oni forgesis aŭ ne plu atentis, sed restas la realo, sur kiu baziĝas la imagoj, la homa spiritostato.

Laŭ tiuj malnovaj instruoj, kiuj fariĝis legendoj, okazas en la homaj animoj batalo inter Dio kaj diablo. Nuntempuloj ridas pri tiu pratempa superstiĉo. Tamen ĝi estas fakto kaj la plej grava el ĉiuj en la homa kaj homara vivo.

La strukturon de la materio la homoj eltrovis kaj jam utiligis la scion por siaj celoj, sed la problemo de malbono estas nesolvita. Unuflanke troviĝas en ni inklinoj, kiuj igas nin fari agojn, kiuj kaŭzas al aliaj afliktojn, suferojn, morton, aliflanke tiaj, kiuj kreas bonon, feliĉon. Kaj la inklinoj, kiuj kaŭzas malbonon, nin pelas kaj tiras, kvazaŭ ni estus nur robotaj ludfiguroj de vera, persona diablo.

*

Kiam malgrandaj knabetoj unuafoje ekvidas insekton aŭ alian malgrandan beston, la pli multaj el ili komencas iel turmenti aŭ dispecigi ĝin aŭ senhezite tuj frakasas ĝin. Ekzistas esceptoj, sed ili estas ne multaj.

Kiam la knabeto fariĝas iom pli granda kaj ekvidas birdon aŭ sciuron, li ordinare tuj serĉas ŝtonon por ĵeti ĝin sur la beston.

La infanoj ne estas konsciaj pri tiu signifo de la ago, kiun perceptas la plenkreskulo. Estus erare diri, ke tia infano estas malbona, ĉar ĝi ne komprenas la signifon de sia ago. Tamen la rezulto estas malbono.

Du knaboj interbatalas. Ilia instruisto provas interpacigi ilin. Preskaŭ senescepte diras unu el ili: "Estas li, kiu komencis, mi nur redonis al li." En la pli multaj kazoj la alia diras la samon. La instruisto demandas, kiel la ofendito ne turnis sin al li, kiam la alia atakis — tiel oni evitus pluajn batojn kaj ploradon. "Oni tamen devas redoni, oni tamen rajtas redoni."

Venĝemo, envio, memamo kaj aliaj homaj ecoj akompanas la homojn dum la tuta vivo. La koncernaj homoj mem malmulte aŭ tute ne scias pri la vera senco de siaj inklinoj. Tial tiaj kvalitoj kun ĝiaj pretendoj ofte aperas eĉ sub la nomo de justamo. Sed se ili ne konas siajn propajn kvalitojn, ili tamen konscias pri la celata efiko de siaj deziroj aŭ agoj: "Oni tamen devas redoni al ili, ili meritas tion."

Knabeto, kiu nekonscie suferigas estas senkulpa. Plenkreskaj homoj, kiuj suferigas, estas kulpaj almenaŭ en tio, ke ili ne uzas tiun pensokapablon, kiun ili havas. En ĉiuj aliaj kampoj racia rezonado estas necesa kaj alte taksata, sed en la interpopola konduto ĝi preskaŭ mankas. Se oni rezonadas kaj tamen kaŭzas detruon, la premisoj estas falsaj. Nura logiko ne estas racio. "La vero vin liberigos." Racio kaj vero estas la sama afero. La vero estas, ke ne malbono sed nur bono povas kontentigi kaj doni sencon al la vivo.

*

Dum deko da jaroj la germana hakokruco estis por la pli multaj popoloj insigno de plej granda malbono. Tiu speco de hakokruco signifas laŭ malnova hinda simboliko memdetruon. Okaze la insigno estis ĝuste elektita, kvankam la elektantoj tion verŝajne ne sciis.

La detruo kaj la memdetruo sub tiu insigno nun finiĝis. Multaj opiniis kaj eble ankoraŭ opinias, ke per tio finiĝis la malbono, kaj nun venos eterna paco.

Insignoj tamen ne estas magiaj, kvankam oni iam tion kredis, kaj eĉ la kristana kruco povus servi kiel insigno por detruo. La popoloj havas diversajn kvalitojn, sed certe ne nur en unu troviĝas inklinoj, kiuj povas kaŭzi malbonon. Ĉu ne ĝuste tion oni eksentis, kiam venis la unua sciigo pri la atombombo?

La grandpotencoj unuanime deklaras, ke ili faris fundamenton por daŭra paco, kaj ke ili klopodas nur por paco kaj feliĉo al la homaro. Samtempe ĉiu el ili deklaras, ke tiujn kaj tiujn bazojn ni nepre devas havi por sekurigi nian propran pozicion kaj la mondpacon.

Fundamento por daŭra paco estos ne ŝtatestaj kontraktoj sed la spiritostato kaj volo de la popoloj mem, de la homoj mem — se ili atingos tiun staton kaj tiun volon. En sia sinteno al ŝtatgvidado kaj milito la popolamasoj similas al tiuj centmiloj, kiuj laboris por fabriki la atombombon: agas laŭ instruoj, ricevas sian salajron kaj absolute nenion scias pri la produkto, kiun oni fabrikas.

Tiu plimulto el la homoj, kies ĉefaj intereso kaj edifo en la vivo estas sportrezultoj, dancejaj amuzoj kaj sensocitaj filmoj, kiuj mokridas kaj mokparolas pri kulturo kaj kulturaj kvalitoj, tiu plimulto ne kreas pacon. Ili laboras laŭ instruoj, pri la produkto ili ne scias kaj eĉ ne havas intereson pri ĝi.

La kompleta ekspluato de la tero kaj la grandega interdependo de la homoj faras la problemon de kolektivaj malbono kaj bono pli grava ol iam antaŭe. La scioj kaj kapabloj de la homoj estas gigantaj, kaj ili ankaŭ povas krei gigantan malbonon.

Dio kaj diablo — jen la homo, nun kiel antaŭ jarmiloj. Sed nun ni venis al punkto en la homa historio, kie ni vole nevole devas konscie decidi pri la direkto de niaj klopodoj. Ĉiu konscias pri la efiko de tiuj kvalitoj ĉe ni, kiuj iam produktis la bildon de la diablo. Ne atenti pri tio estas krimo. Konscie preteksti pravigon por detruo kaj suferigo estus kulmino de diableco.

Ni devas elekti — Dion aŭ diablon.

Kelkaj sciencistoj diras, ke nia tero kun la homoj kaj ceteraj vivaj estaĵoj tre verŝajne estas unikaĵo en la tuta universo. Ĉu jes aŭ ne — certe ĝi estas tiel unika, ke ni devus kun respekto rigardi ĝin kiel tre altvaloran kreaĵon, kiun ni ne devus facilanime detruoj same kiel knabeto dispecigas papilion.

Cinikuloj diras, ke kiom ajn da sufero kaj kiom ajn da mortigoj ne gravas, se ni rigardas ĉion laŭ pli granda perspektivo. Eĉ detruo de la tero estus nur malapero de polvo en la universo.

Ni ne konas la spiritaĵojn de la universo, sed se ni forĵetas mensogojn kaj pretekstojn la spirito en ni diras, ke nia vivo devas havi senco, kaj ke la senco estas evoluo al bono. Nia plej profunda sed tro ofte sufokita deziro estas tiu de la finvortoj en Bhagavad Gita: Paco al ĉiuj mondoj!

Diplomatia Lingvo en Svedujo

De profesoro NILS AHNLUND

Ekzistas malnova sveda anekdoto laŭ kiu Johan III¹, kiam li foje ricevis hispanlingvan leteron de Filipo II, montris sian malaprobos uzante en sia respondo la finnan lingvon. La historio troviĝas en diversaj variantoj el la jardekoj ĉirkaŭ 1700; kelkaj opiniis, ke la malplaĉa letero estis en la franca kaj de iu el la francaj reĝoj, necerte de kiu. Johan estis ja antaŭe duko de Finnlando. Certe tomas pri nura legendo. Efektive Johan ŝajne ne estis tiel sentema pri tiaj aferoj; okaze li mem uzis la italan en sia korespondo kun hispanaj diplomatoj.

La kerno de la afero kompreneble estas la koncepto de la svedoj, ke la diplomatia rilato inter formale egalaj ŝtatoj devus okazi latine. Peki kontraŭ tiu regulo signifis mankon de respekto kaj senbazan pretendon, postulon pri supereco, kiun la alia parto devis kontraŭagi, se certaj cirkonstancoj ne kreis interkonsentitajn esceptojn. Tiel la svedaj kaj danaj kancelarioj de malnova tempo interkorespondis en respektivaj naciaj lingvoj. Kaj en Stokholmo kaj en Kopenhago, precipe en la lasta, la germana samtempe pro longa kutimo ricevis vastan uzon en la rilatoj kun germanaj ŝtatoj; en la tempo de Gustav Vasa² kaj Kristian III okazis eĉ, ke oni skribis gravajn sved-danajn kontraktojn en tiu lingvo. Svedoj kaj rusoj kontraŭe kutimiĝis fari siajn intertraktojn per interpretistoj, kaj kiel pruvo pri plena egaleco ĉiu uzis sian lingvon en la interŝanĝataj traktatoj, tiel ke la rusa originalteksto iris al Stokholmo kaj la sveda al Moskvo. Sed cetere regis la latino. Precipe la supereco de la poloj en tiu kampo estis foje iom neagrable; sur la sveda flanko oni dum la tempo de Karl IX³ devis foje peti helpon de episkopoj.

Tiaj estis la cirkonstancoj dum la malnova Vasa-tempo. La regado de Gustav Adolf alportis sole tiun ŝanĝon, ke la germana kaj la franca, sed ankaŭ la itala kaj la nederlanda,

¹ Vidu notojn post la fino de la artikolo.

komencis okupi iom pli da loko en la alvenantaj depeŝoj; nia nova diplomatio devis ja unue grandparte uzi fremdajn talentulojn. La takto de la okazado estis tre rapida, kaj la praktika bezono decidis en la multo de diversaj aktualaj taskoj. Koncerne la ŝtataktajn de ekstera politiko la regna kanceliero tamen zorgis, ke oni ne preterlasis la latinan kutimon. Por Axel Oxenstierna⁴ la latino estis vivanta lingvo, nesuperebla kaj oportuna rimedo por ĉiu interpopola politika komunikado. Li volis nepre defendi ĝian tradician rangpozicion kontraŭ la kreskanta konkuro kaj de la franca kaj de la germana. La diplomatoj de Richelieu montris en ĉiuj stadioj de la konversacio fortan preferon por sia propra lingvo, kaj la germana kunligpolitiko de Svedujo preskaŭ nerimarkate alportis de tiu flanko diversajn pli grandajn postulojn pri lingvaj konsideroj. El la vidpunkto de la kanceliero neniom signifis tiurilate, ke li mem de sia junaĝo parolis kaj skribis la germanan kiel enlandano, dum li tolereble posedis la francan sed ne volonte uzis ĝin en parolo kaj neniam en skribo, escepte maloftajn enŝovitajn frazojn. Same forte kiel li malaprobis la tendencojn de la germana forpuŝi la latinan el unu el la plej centraj kampoj de la sveda diplomatio, eĉ superregi la propran lingvon de Svedujo en pure internaj svedaj aferoj, same firma estis lia antipatio kontraŭ la novmoda rolo de la franca en la diplomatia kutimo. Lian programon oni povas esprimi tiel, ke la sveda bezonas cedi nur al la latino. Post lia reveno al Svedujo 1636 tiu konservativa nacia programo iom post iom efektiviĝis.

"La regna kanceliero malaprobis tiun malbonkutimon, kiun parto de la svedoj uzas, ke ili, malestimante sian propran gepatran lingvon, skribas siajn leterojn germane al la Reĝa Moŝto kaj la registaro, kaj konsideris necese, ke oni 1. admonu ĉiujn ministrojn regios, ke ili cedu tion; 2. respondu en nia lingvo al ĉiuj eksterlandaj leteroj, kiuj ne estas latine skribitaj, ili estu de reĝoj, potenculoj, respublikoj aŭ urboj." La eldiro troviĝas en la registara protokolo por 1639, sed la nun konfirmita principo ne estis tute nova. Jam 1637 oni en la registaro konsideris, ĉu oni respondu la leterojn de la elektoprince de Brandenburg latine aŭ svede, "ĉar li kutimas

uzi nur la germanan". Oni tiam por ne kaŭzi malpacon trovis bone respondi latine "tiun ĉi fojon", sed dume fari rimarkigojn pri la afero. Tamen tio malmulte helpis, kaj la kanceliero devis armi sin per pacienco. Kelkajn jarojn poste, 1641, kiam oni en aŭdienco en la reĝa kastelo akceptis brandenburgan senditon kaj li malkontentigis la kancelieron transdonante sian komision germane, tiu evidente sentis fortan tenton respondi svede sed kontentigis per pli milda manifestado kaj parolis latine. Preskaŭ samtempe venis la unua portugala ministro al Stokholmo, laŭdire ne tre bona latinisto. Oni nun komunikis al li, "ke en la registaro neniu parolas portugale; tial kaj se la sendito uzos sian gepatran lingvon, la registaro uzos la svedan lingvon kaj komisios al secretarios ambaŭflanke interpreti latine inter si". La protokolo poste rakontas, kiel la ŝajne iom ĝenita Francisco de Sousa Continho, enkondukita en la aŭdiencon, "el ĉe la brusto" disvolvis latinan manuskripton kaj laŭtleĝis ĝin, post kio la pli lerta legacia sekretario transprenis la necesajn replikojn.

Francoj kaj germanoj kontraŭe ŝajnis persisti en siaj kutimoj. La kuratora periodo⁵ proksimiĝis al sia fino kaj konsiderante la estonton Axel Oxenstierna 1642 trovis la tempon matura por montri pli instruan ekzemplon. Johan Oxenstierna raportis de la pacokongreso en Germanujo, ke la franca ambasadoro d'Avaux spite ĉiujn ĝentilajn rimarkigojn venis kun letero post letero en la franca; la patro konsilis al li respondi svede "kaj en tio uzi svedan kutimon, ĝis li komencos skribi latine". Tiu okaza afero ordiĝis, sed principe la francoj ne cedis: "Kun Francujo estos plue traktata, kaj dume oni skribu kaj parolu latine", diras samjara registara protokolo. Cetere oni fiksis kiel regulon, "ke ĉiu nacio, kiu al ni skribas aŭ parolas latine, al tiu ni same respondu; kiu parolas en sia gepatra lingvo, al tiu ni respondu svede". Per Brahe komentis: "Kiam ili scias aŭ nian lingvon aŭ la latinan, tiam ni same respondas, sed kiam ili pro fiero parolas nur sian gepatran lingvon, tiam ni parolas svede". La kaŭzo de la diskuto kaj decido estis plej proksime tio, ke oni atendis du senditojn el Brandenburg; ŝajne tiuj tamen subsentis, kion oni preparas, preferis paroli latine kaj tiel evitis atenton.

Sed ne longe post tio oni havis viziton de juna princo el Mecklenburg, kaj kiam li dum la aŭdienco faris paroladon germane, la respondo senprokraste venis en la sveda. Estis la unua fojo, kiam tia afero okazis; la okazo kaŭzis diversajn komentojn, kaj oni ĝenerale demandis sin, ĉu post tiu malgranda preludo sekvos daŭrigon pli grandstilan.

Daŭrigo tamen ne povis manki, ĉar Francujo tute ne emis akcepti repelon al la latino per admona argumentado de tia speco. La afero kulminis je la solena akcepto de la ambasadoro Thuillierie en la reĝa kastelo 1644. Kun plena scio pri la nun firmaj kutimoj de la sveda kortego li plenumis sian taskon france, kaj Axel Oxenstierna, kiu estis tute preparita pri tio, respondis lian paroladon svede, dum interpretisto frazon post frazo tradukis en latinon. Kunaganto estis la juna reĝino Kristina⁶; kvankam ŝi rezervis por si rajton transiri al la franca en "familiara babilo" kun la ambasadoro, ŝi en publika apero kun evidenta plezuro sekvis la ekzemplon de sia kanceliero. Malmultajn horojn post tio oni donis aŭdienccon al nederlanda sendito, de Witt, sed nun oni ambaŭflanke parolis sole latinon. Tiuj du aŭdiencoj karakterizas la ĉefformojn de la etiketo en tiu kampo, kia ĝi fariĝis en la tempo de Kristina kaj laŭ la deziro de Axel Oxenstierna defendi la rajton de la propra lingvo. Apud la Francujo de Richelieu kaj Mazarin staris same memkonscie la Anglujo de Cromwell, kies ambasadoro Whitelocke 1654 parolis angle al Kristina, kiam li transdonis sian rajtigilon, tradukata en la francan, dum la reĝino parolis svede kaj oni tradukis en latinon. En siaj privataj interparoloj kun la puritana sendito Kristina parolis france.

Post la vestfala paco la rilato al la imperiestro kaŭzis similiajn ceremoniajn problemojn. Ekzemple en kiu lingvo devus la reĝino skribi sian unuan propramanan leteron al Ferdinando III? Salvius memorigis pri tio, ke Gustav Adolf en similaj skribaĵoj ofte uzis la germanan. Schering Rosenhane konsideris la francan plej bona. Karl Gustav⁷ voĉdonis por latino "ĉar ŝia Majesto ĝenerale estas laŭdata kiel klera sinjorino", kaj lin apogis Björenklou, pro tradiciaj motivoj. Kristina elektis latinon. En tio same kiel en elekto de diplo-

matia lingvo por la interrilato kun Vieno ŝi estis tute konsekvenca: "Se Cezaro ne pre volas uzi la germanan, la Reĝa Majesto uzos la svedan. Sed se Cezaro skribos latine, la Reĝa Majesto respondos latine, kaj se Cezaro traktos la Reĝan Majeston ĝentile, la Reĝa Majesto faros same." En tiuj aferoj Kristina estis dum sia tuta regado fidela lernantino de sia regna kanceliero. La vidvino de elektoprinco Maximilian de Bayern sciigis 1651 en funebra letero pri la morto de sia edzo, germane; la reĝino dankis kaj kondolencis svede. La kleruloj en la kortego estis en ekstazo pro ŝia intima kono de roma verkisto tiel malfacila kaj profundpensa kiel Tacitus, sed ŝia vera ĉeflingvo tamen estis la franca, kiun ŝi ja majstre regis. Malpli konate verŝajne estas, ke ankaŭ la palatino Karl Gustav preferis tiun lingvon antaŭ la germana en sia pure persona korespondo. Rilate al la maljuna regna kanceliero lia ofte esprimita prefero por la latina ne malhelpis, ke li plurfoje, praktika homo kiel li estis, montris malkontenton pri tio, ke oni en la universitato en Uppsala tro malatentis la modernajn lingvojn, antaŭ ĉio la francan.

La gardo pri la interesoj de la gepatra lingvo havis internan flankon. Forgesita sed memorinda propono de Kristina en la regna konsilantaro 1652 memorigas pri tio. Ŝi deziris, diras la protokolo, "ke oni por kulturi la svedan lingvon fondu tie ĉi ĉe la kortego akademion, kiel en Francujo estas kutimo. Kie oni povus forigi la fremdajn lingvojn kaj des pli bone elekti el la sveda. Al tio apartenus ankaŭ la poezio, per kiu oni ankaŭ povus pliperfektigi la lingvon." Axel Oxenstierna malpli interesis sin por tiuj pensoj pri la estonto; cetere li estis malmulte entuziasma kaj por la persono kaj por la klopodoj de Stiernhielm⁸. Aliflanke li tra la jaroj nutris vanan esperon, ke oni povos fari la svedan ofica lingvo en la baltaj provincoj oriente de la maro, kaj ĉiam incitis lin la entrudo de la germana en internajn kampojn de sveda socia vivo.

Estas sufiĉe ĝenerala sed senbaza koncepto, ke la vestfala packongreso konfirmis la regopozicion de la franca en la diplomatio de Eŭropo. Efektive tiu rango apartenis ankoraŭ al la latino, kaj sendube kontribuis al tio en sufiĉe alta grado

la celkonscia lingva politiko de Axel Oxenstierna. Ankaŭ la feŭdotranspreno aŭ investituro de la novaj svedaj provincoj en Germanujo okazis latine, pri kio la imperiestro konsentis nur post sufiĉe forta diplomacia lukto. Poste la regulo estis, ĝis la komenco de la 19a jarcento, ke la imperiestro en sia oficiala korespondo kun la svedaj regantoj uzis la latinan, se ne temis pri internaj aferoj de la Germana regno: ĉar en tiaj kazoj oni ja konsideris la germanan kiel memkompreneblan lingvon. Longe superregis la latino ankaŭ en la korespondo kun la reĝoj de Anglujo, Hispanujo, Portugalujo, Napolo, Sardinio kaj Polujo. La elektoprincoj de Brandenburg kaj la reĝoj de Prusujo daŭrigis laŭ la sama vojo ĝis la fino de la granda norda milito. La nederlandaj Generalŝtatoj, kiuj devis cedi al Axel Oxenstierna kaj reiri al latino, nur 1805 ĉesis uzi tiun lingvon en siaj skribaĵoj al la sveda registaro.

Precipe unu fruan escepton oni povas noti. Jam la kancelaria regularo de 1661 fiksas la reciproke rekonitan pozicion de la franca kiel "la kutima lingvo" por la rektaj rilatoj inter Svedujo kaj Francujo. Tio estis, oni povas diri, tributo al la historia alianco. Sed ke oni ne emis konsenti la saman avantaĝon al aliaj suverenoj montriĝis 1692, kiam reĝo Vilhelmo de Anglujo skribis france al Karl XI. La kancelaria kolegio trovis la aferon serioza kaj inda konsideron de diversaj flankoj. Oni proponis respondon en la sveda kaj fortigis sin per la memoro pri la legenda finna letero en la tempo de Johan III sed fine akceptis la germanan kun tiu konsolo, tiel karakteriza por la samtempaj samlandanoj de Olof Rudbeck⁹, "ke la germana devenas el la sveda". Kiom oni scias, la germanan cetere estis la sola fremda lingvo, kiun la tiam reganta sveda monarko persone uzis.

Pluraj el la italaj kortegoj alprenis la kutimon — laŭ malnova enlanda tradicio — fari siajn skribaĵojn al la sveda registaro en sia propra lingvo. Karl XII, ankaŭ li zorganta pri la egalrajto de la sveda, vidis tion kun kreskanta malkontento kaj konsideris kontraŭagojn. Olof Hermelin rakontas pri tio en siaj leteroj el la restado de la armeo en Saksujo 1707. "Oni ankaŭ konsideris", li skribis al sia kolego en la hejmlando la kancelaria konsilisto Samuel Bark, "respondi

ĉiujn francajn kaj italajn leterojn svede, precipe ĉar oni ne vidas kaŭzon, kial ni ne honoru nian lingvon, same kiel aliaj honoras la sian." Bark konsideris senŝance komenci proceson kun la reĝo de Francujo, "ĉar li rajtigis sin al ĉiuj potenculoj uzi sian lingvon"; sed la afero devus esti facile aranĝebla kun "la bonaj italaj sinjoroj, kun Loreno kaj tiaj Principini". Aliaj sinjoroj en la kancelario malaprobis ŝanĝojn kaj trovis plej bone resti ĉe la estanta kutimo aŭ fuŝrutino, interalie pro tio, "ke la italaj dukoj neniam povus latine skribe tiel humile kaj subule, kiel ili nun faras en sia lingvo". Certe tamen estas, ke laŭ la tiam ankoraŭ valida sveda diplomacia ceremoniaro tiuj fremdaj senditoj, kiuj en aŭdienco ne parolis latine, devus ricevi respondon svede.

Se ni rigardas la leterojn de la svedaj ministroj al sia registaro aŭ al la kancelario, montriĝas ja iom alia evoluo. Dum la tuta 17a jarcento la loko de la franca tamen estas relative negranda. Kun la 18a jarcento vere fariĝis pli ordinare, kiel montris Th. Westrin en konata diserto (Historisk Tidskrift 1900), ke svedaj legacioj en eksterlando uzas la francan en siaj komunikoj al la kancelaria prezidanto. Sed rimarkinde estas, kion ankaŭ akcentas Westrin, ke la regopotenca parlamento de la liberecĉepoko¹⁰ emfaze reagis kontraŭ tiuj kutimoj, kiuj el ĝia vidpunkto malfaciligis la intencitan kontrolon de unu parlamenta periodo ĝis alia, kaj per la Sekreta komisiono ĝi plurfoje insiste admonis, ke tia publika korespondo okazu "sole en la sveda". Gustav III¹¹ transprenis la sistemon sen ŝanĝi ĝin, malgraŭ sia vigla entuziasmo por ĉio franca, sed dum la tempo de Gustav IV Adolf¹² la franca, kio estas sufiĉe surpriza, rapide kaj grandpâse fariĝis la superreganta deĉaŝlingvo ĉe ni. Kaj kiam Karl Johan¹³ printempe 1811 transprenis la gvidon de la ekstera politiko, sekvis la decida paŝo; tiam oni ordonis ke la franca estu sola lingvo por tiaj deĉaŝoj. Nur 1855 okazis ŝanĝo en tio, parte kun konsidero al norvegaj deĉiroj, per cirkulero al legacioj pri reiro al la gepatra lingvo — sveda aŭ norvega — en ĉiuj t. n. kurantaj aferoj en la ministeria korespondo.

Tradukis S. Engholm.

Notoj

1. Johan III — sveda reĝo 1568—1592.
2. Gustav Vasa — reĝo 1523—1560.
3. Karl IX — reĝo 1599—1611.
4. Axel Oxenstierna (Aksel Uksenŝerna) — regna kanceliero dum la tempo de la 30-jara milito.
5. 1632—1644, kiam kuratora registaro regis por la neplenaĝa filino de Gustav II Adolf, Kristina.
6. Kristina — filino de Gustav II Adolf, reĝino 1644—1654.
7. Karl Gustav (el la germana Pfalz) — Karl X Gustav, reĝo 1654—1660.
8. Stiernhielm (Ŝernjelm) — "patro de la sveda poezio".
9. Olof Rudbeck (Ulov Rudbek) — Giganto de klero kaj nacia fiero, verkis libron — *Atlantica* — en kiu li provis prui, ke Svedujo estas Atlantida kaj prahejmo de la eŭropa kulturo.
10. Liberecepoko — post la aŭtokratio dum Karl XII la parlamento havis absolutan potencon 1719—1772.
11. Gustav III — reĝo 1772—1792.
12. Gustav IV Adolf — filo de la antaŭa, reĝo 1796—1809.
13. Karl Johan — la franca marŝalo Bernadotte, kiu fariĝis sveda tronheredanto kaj poste reĝo 1818—1844.

Pacmovado kaj nuntempo

De P. TH. JUSTESEN

Post la gigantaj okazoj de la lastaj jaroj ni nun troviĝas en situacio parte nova. Tial estas por ni ĉiuj nature, jes, nepre necese fari resumon por klarigi al ni mem kaj al aliaj, kie ni staras. Tio koncernas ne malplej la pacistojn, al kiuj apartenas ja ankaŭ ni esperantistoj. Oni diras, ke nun estas paco en Eŭropo; sed pace — ne, nek en Eŭropo nek en la mondo kiel tuto.

Laŭ iliaj opinioj pri milito oni povas dividi la homojn en jenajn kategoriojn: militaristojn, defendemulojn, defendnihilistojn kaj sennaciulojn.

Veraj militaristoj estas restaĵo el pratempo. Iam preskaŭ ĉiuj homoj estis militaristoj, ĉiuokaze preskaŭ ĉiuj nacioj. Nuntempe la rilato estas alia. Militaristoj certe estas ankoraŭ tre oftaj en Japanujo kaj (eble iom malpli) en Germanujo, malpli elstaraj en Francujo kaj Anglujo, tre maloftaj en Svisujo, Svedujo kaj Norvegujo, preskaŭ ne ekzistantaj en Danujo. Ili admiras, eble eĉ ŝatas la "vigligan, agrablan militon", kaj konsideras ĝin perioda necesaĵo, puriganto (kiel fulmotondro) kaj renoviganto. Iom da vero estas en tio. Oni ne povas nei, ke milita tempo krom nepriskribebla mizero alportas ankaŭ evoluon, renovigon, viglon. Aleksandro kaj Cezaro estis konkerantoj, sed samtempe ili disvastigis kulturon tra novaj regionoj. La franca revolucio estis sanga kaj terura, sed ĝi naskis la homajn rajtojn. Tamen la pli multaj el ni opinias, ke la metodoj de milito estas tiel abomenaj kaj ĝia evoluo tiel terura, ke ni devas postuli ĝian forigon. Modernaj homoj devas esti kapablaj trovi vojojn pli bonajn, pli homecajn.

La defendemuloj volas forigi atakmilitojn kaj per tio ĉiujn militojn, sed ili tenas la konvinkon ke memdefendo estas fundamenta homa rajto, eĉ devo. Ŝajnas al mi, ke la nun finita milito en alta grado konfirmis tiun opinion. Defendemuloj estas ĉiuj, kiuj dum la milito ĝojis pro la venkoj de la aliancaj, ĉar estas ja sama celo, ĉu oni mem batalas per

armilo en mano aŭ lasas iun alian batali por si. La defendemuloj deziras plibonigi kaj pacigi la mondon per kunlaboro, internacia helpo, frateco, esperanto ktp. Ili estas infanoj de la nuno, realistoj, sed ankaŭ optimistoj.

La defendnihilistoj nomas sin "veraj pacistoj". Ili en neniuj cirkonstancoj volas permesi uzon de armiloj. Se fremda potenco bontrovas okupi ilian landon, ili — kun protesto — akceptas la fakton kaj per intertraktoj provas atingi kiel eble plej bonajn kondiĉojn. Tiel volis en Norvegujo Quisling, en Danujo Scavenius kaj Gunnar Larsen, en Francujo Laval. Ili kunlaboras kun la malamikoj, sed se ili estas konsekvencaj, ili devas deziri, eĉ postuli, ke neniuj fremdaj potenco prenu partion por ili kaj provu elĵeti la okupan potencon. Tiu deziras ja nun nur pacon; ĝi volas nur konservi la (novan) ekzistantan ordon.

La defendnihilistoj estas homoj por malproksima estonto; ili ne konsideras la statojn kaj eblojn, kiuj en la nuno karakterizas la mondon. Ĉu ne malfermiĝis al multaj el ili la okuloj dum la nun finita milito? Vi mem? Ĉu vi sentis doloron, kiam venkis la aliancaj? Ĉu ĉagrenis vin, ke la milito ne finiĝis en 1941. Tiuokaze vi estas "vera pacisto".

La defendnihilistoj en la malgrandaj ŝtatoj ĉiam asertis — kaj eble ankoraŭ asertos — ke tiuj ne povas defendi sin kontraŭ grandpotenco, kaj ĉiuj defendpreparoj dum tiaj kondiĉoj estas senutilaj aŭ eĉ malutilaj. Sed kion montris la milito? Tute malgrandaj kaj ĉe tute senarmilaj ŝtatoj havis konsternan kapablon por defendi sin. Ili ja ne povis malhelpi, ke la malamiko inundas ilian landon, eĉ ne tiuj, kiuj preparis sin por fari provon; sed ili povis en alta grado paralizi la agadon de la malamiko en la lando, kaj kiam ili ricevis helpon de ekstere, ili en tre konsiderinda amplekso povis kunhelpi por repeli lin hejmen. Ne per sia kulturo ili tion faris. La frazon pri kulturo kiel defendo ni estonte preferos ne aŭdi. La milito tute kontentige montris, ke neniuj kulturo povis fortimigi la germanojn, kaj ke armiloj ĉiokaze por kelka tempo povas forbalai ĝin, fermi universitatojn kaj ekzili la inteligentulojn. Malgranda nacio ne povas fidi al kulturo kiel defendilo, ankaŭ ne al armiloj — sed al la defendovolo! En vico da jaroj oni

en la pli multaj landoj provis sisteme subfosi la defendovolon kaj ŝajne kun granda sukceso. Sed la rezulto estis nur ŝajno. Kiam malamiko inundis la landon, la defendovolo ekflamis kaj iom post iom fariĝis fajrego, kiun neniuj armiloj povis estingi. Ni ne fermu la okulojn antaŭ tio, kaj ni ne forgesu tion. La defendovolo estas instinkto, kiun neniuj povas subpremi, kaj ĝi montris siajn forton kaj valoron. Tiu, kaj sole tiu, estas defendilo kaj ŝildo de popolo. Svisujo kaj Svedujo sukcesis resti ekster la milito. Ĉu pro granda forto? Certe ne. Timigis ankaŭ ne iliaj defendpreparoj, kvankam ili certe estis konsiderindaj kaj certe ankaŭ iom efikis. Ne! Antaŭ ĉio impresis ilia nedubebla kaj forte manifestita defendovolo. Oni preferis ne tuŝi ilin. Ili estis kiel abeloj, tre pacaj kaj amindaj bestoj — sed estas prudente resti en certa distanco de ili.

Fine pri la sennaciuloj. Ili malatentas ĉiujn limojn kaj diferencojn inter la nacioj, kaj fizikajn kaj moralajn. Ili konas nur unu nacion, la homaron. Ili vivas en idealmondo, kiu eble iam realiĝos, sed kiun ni ankoraŭ ne vidis. Tiuj estas ekster kalkulado.

Zamenhof nomis sin "homarano", kaj tia ĉiu el ni vere kaj sincere devas esti; sed la vorto diras nenion koncerne lian aŭ nian sintenon antaŭ atakanta malamiko.

Kiun konkludon ni povas tiri el tiuj konsideroj? Ke la pacmovado ne mekanike kaj senpense daŭrigu en la malnova sulko kaj kun la malnovaj agitvortoj. Post tia kataklismo ni ne povas nur reiri al la tagordo. Ni devas konsideri la situacion, kia ĝi estas, kaj agi laŭ tio. La defendnihilistoj devas en ioma grado ŝanĝi la signalojn, se ili deziras ludi iun ajn rolon en la politika mondo. Ekzistas multaj vojoj kaj ebloj. Interalie ni esperantistoj konsilas al ili interesi sin por esperanto, bonega ilo por praktika paclaboro. Ke ĉiuj pacistoj tuj lernu esperanton eble estas troa postulo; sed ĉu oni ne povus instigi la gvidantojn trapasi malgrandan kurson en la lingvo, per kio ili tamen povus akiri tiom da scio pri ĝi, ke ili povus kompreni la grandiozecon kaj kulturan signifon de la movado? Eble ili post tio helpus en nia laboro por esperantoinstruo en la lernejoj. La gvidantoj de la pacistoj estas ja preskaŭ ĉiuj instruistoj aŭ homoj de ties kultur-

velo. Post du aŭ tri lecionoj ili devus esti kapablaj prijuĝi la ideon de la lingvo same kiel la celon kaj la vojojn de la movado. Eble ili tiam en unu jaro farus kulturalan laboron, kiu estus multe pli valora ol centjara antimilitarismo. Eble ni devus inviti certajn rondojn, precipe instruistojn kaj studentojn, al tiaj kursetoj, tute senpage, eble eĉ kun taso da kafo. Ankaŭ instruistoj kaj studentoj estas ja nur homoj. Ĉu ni ne pensu pri tio!

Vivo en Aŭstralio

De C. J. CALDERA

Sub influo de la nuna milito oni eltrovis, ke la loĝantaro de Aŭstralio estas malgranda kompare al la amplekso de la lando, kaj la registaro jam parolas pri postmilita enmigra politiko. Informoj pri la vivo en tiu ĉi transmara lando eble interesos eksterlandanojn, kaj pentri skizon pri ĝi estas la celo de mia artikoleto.

Antaŭ 20 jaroj, kiam mi ankoraŭ loĝis en Eŭropo, mi rimarkis, ke eĉ personoj de la t. n. supera klaso, sekve havantaj sufiĉan geografian edukon, konsideras Aŭstralion kiel ian dezertolandon kun miksitaj loĝantaro, plejparte nigra. Pli malpli oni sciis pri ekzisto de urbegoj kiel Sidney kaj Melbourne, sed oni ankoraŭ imagis, ke tiuj urboj, kvankam kun granda loĝantaro, estas iom primitivaj kaj koloniecaj. Kiam oni venas al tiuj havenoj, oni fakte ekmiras pri tiaj malveraj supozoj, ĉar la pejzaĝo kaj la beleco de la konstruaĵoj estas favore kompareblaj kun la nordamerikaj urboj. Vere mankas en Aŭstralio tiuj monumentoj artaj kaj arkitekturaj, kiujn oni trovas abunde en la malnovaj eŭropaj landoj; sed se oni konsideras, ke Aŭstralio estis eltrovata antaŭ nur unu jarcento, la postsignoj de socia ekzistado jam estas rimarkindaj.

La vivo en Aŭstralio baziĝas precipe sur terkulturo kun plej diversaj branĉoj. Tritiko kaj lano estas finance la ĉefaj

produktoj, sed en diversaj latitudoj kaj longitudoj oni kulturalas plej diversajn aferojn: de tabako, kanabo, ĉerizoj kaj kaŝtanoj ĝis bananoj, ananasoj, papajoj ktp.

La plej zorge ekspluatata landparto troviĝas laŭ la marbordo, sed ankaŭ aliaj pli enlandaj partoj evoluis pro mineralaj eltrovoj, precipe de oro. Urbetoj subite aperis, kvazaŭ pro bato de fina magia bastono, sed kiam la metalriĉaj rokoj elĉerpiĝis, ili kun sama rapido dezertiĝis. Kelkloke oni vidas urbetojn, kies senhomaj domoj aspektas fantomece, kaj kie nur kelkaj izolitaj maljunuloj postrestas kiel atestantoj pri la ŝanĝo de la sorto.

La aŭstralia kamparo tute ne similas al la aŭropa: verdan koloron oni vidas nur dum la mallonga printempa periodo. La superreganta koloro estas flaveca en ĉiuj nuancoj, de la nuanco de sablo ĝis tiu de sekaj folioj kaj herbo, ĉar somere sunvarmo kaj akvomanko sekigas ĉiujn kreskaĵojn. Nur en lokoj elektitaj por specialaj kulturadoj, kie la homa laboremo kreis irigacion, oni trovas oazojn de verdo.

Ĉiuj bienoj konsistas el granda arco nur parte kulturita. Kelkloke troviĝas ankoraŭ grandegaj eŭkaliptoj, kelkaj vivantaj sed plej ofte jam mortintaj pro la ringa detranĉo de la ŝelo proksime al la bazo. Tio estas la metodo, kiu oni uzas en Aŭstralio por mortigi arbojn. Unu jaron post la ringtrancĉo oni faligas ilin kaj bruligas surloke por liberigi la teron por kulturado. Ĉiujare oni tiel detruas teruran amason da ligno, ŝajne malŝpare sed fakte ne tute senutile, ĉar la cindro fekundigas la grundon, kiu ĉie estas malriĉa je potaso. Iom teruraj kaj fantomaj aspektas tiuj ĉirkaŭtrancĉitaj arboj, senfoliaj, kun branĉoj ofte rompitaĵoj de la ventegoj kaj nigriĝitaj de la preskaŭ ĉiujaraj someraj arbaraj fajroj.

Ofte oni veturas dum horoj tra tia pejzaĝo sen vidi dometon aŭ kabanon. Fine oni atingas senarban etendaĵon, kie pikildrataj bariloj dividas la kampojn. Printempe oni vidas sur ili ondantan grenon, sed somere post la rikolto nur stoplon, kie paŝtas sin la brutoj. Veturante tra la kamparo oni ĉiam renkontas arojn da kunikloj, rapide kurantaj en ĉiuj direktoj. Foje oni ektimas pro subita apero de kanguruo, kiu movas sin per gigantaj saltoj, kiujn ĝi faras starante sur la postaj kruroj

kaj per helpo de la fortika kaj granda vosto, kiu dum la salto puŝas la korpon antaŭen. En aliaj distriktoj oni povas renkonti amasajn da dromajoj, kiuj paŝtas sin sur la kampoj. La menciitaj bestoj estas la tri plej gravaj plagoj de Aŭstralio. Ĉiujare ili kaŭzas al la bienposedantoj perdon de milionoj da funtoj pro detruo de rikoltoj kaj ankaŭ pro akcelo de tererozio, kiun unue enkondukis troa detruado de arbaroj.

La kamparaj vilaĝetoj en Aŭstralio estas multe pli malgrandaj ol en Eŭropo: du aŭ tri butikoj, hotelo, poŝtoŝeĉejo, policejo en la plej gravaj, du aŭ tri kabanoj uzataj kiel preĝejoj de diversaj eklezioj, iu kiel kunvenloko de la distrikta konsilantaro. En la vilaĝo kunvenas sabate posttagmeze la disa loĝantaro de la distrikto. La viroj, kies religiaj konvinkoj ne malpermesas tion, renkontiĝas por interparoli en la hotela trinkejo, kie okazas la plimulto el la komercaj aranĝoj. Ju pli malfruiĝas, des pli brua fariĝas la tono de la babilado sub la ekscita influo de la biero, la preferata alkoholaĵo de la aŭstralianoj.

La kamparaj dometoj konsistas el lignaj tabuloj metitaj unu sur la alian kiel skvamoj sur fiŝo kaj najlitaj al ligna skeleto. Aliloke troviĝas kabanoj el krudaj trunkoj, tutaj aŭ fenditaj. En regionoj jam pli civilizitaj oni havas konstruaĵojn el asbestaj lamenoj najlitaj al ligna skeleto, tute laŭmodajn kaj komfortajn. Taŭĝe starigitaj vandoj havigas al la posedanto la deziraton nombron da ĉambroj, laŭ la bezono de la familio. La dormĉambroj estas malmulte uzataj, ĉar nur vintre oni dormas en ili. Ĉirkaŭ la tuta domo kaj sub la sama tegmento troviĝas verando, kiu protektas la ĉambrojn kontraŭ rekta varmigo de la sunradioj, kaj tiu estas la komuna dormĉambro dum la pli granda parto de la jaro. La kuirejo ofte estas aŭ kunigita kun manĝoĉambro aŭ por manĝado mem parte dividita per vando, sed ĉiu dometo havas saloneton pli malpli elegantan, tamen ĉiam kun bretaro kun libroj. La aŭstralianoj pasie amas legadon, kaj laŭ la kulturnivelo oni trovas en la bretaroj romanojn kaj librojn religiajn, sciencajn kaj politikajn. Malofte mankas piano aŭ radio en la domo, kvankam ili foje estas malmultekostaj.

La aŭstralianoj estas religiemaj, entute multe pli ol eŭropanoj. Oni trovas, ke ofte ekzistas en la sama familio anoj de diversaj eklezioj: anglikana, katolika, presbiteriana ktp. Toleremo, kompromiso estas karakterizaj ecoj de aŭstralianoj, kaj sendube tio faciligas la kunvivon. Edziĝoj inter anoj de diversaj eklezioj ofte okazas, kaj kutime tia diferenco de konvinkoj ne malhelpas feliĉan kunvivon. Sed strange estas, ke neniue en Aŭstralio, eĉ se li estas liberpensulo, ŝatas publike deklari sian konvinkon, kvazaŭ estus krimo pensi tiel aŭ tiel.

Tie ĉi kiel en Anglujo ekzistas respekto al tradiciaj moroj. Pro la sezona inverso la kristnaska soleno okazas en la varmega somero, sed malgraŭ tio oni manĝas tiam varman pudington, rostitan meleagron, ŝinkon kaj varmajn manĝaĵojn tute ne konvenajn, kiam la termometro montras 40 centigradojn.

La antaŭjuĝo kontraŭ neblankuloj estas same forta en Aŭstralio kiel en Usono. La nigruloj estas devigataj loĝi en specialaj teritorioj tute aparte de la blankuloj. Pro premo de la laboristaro, kiu timas, ke neblankuloj, laborantaj por malpli alta salajro, povus malaltigi la vivnivelon, oni malpermesis eniron de neblankuloj en la landon. Nuntempe oni parolas pri kreo de politiko favora al enmigrado por tiel plidensigi la loĝantaron, sed oni esceptas la flavajn. Mi ne scias, ĉu tiu decido helpas al pacaj rilatoj kun niaj nunaj samliganoj, la ĉinoj.

La aŭstralianoj ĝenerale ŝatas muzikon, kvankam la elekto de muzikaĵoj multe varias laŭ personoj. Ĉiuj ŝatas kantadon, kaj ne povas okazi familia vesperfesto sen ĉeesto de iu kantisto por amuzi la partoprenantojn. Ofte oni havas kolektivajn ĥoretojn de diletantoj, muziktalentaj laŭvorte sed ofte ne fakte.

Rilate al nutraĵo la aŭstralianoj estas viandmanĝantoj pli entuziasmaj ol la eŭropanoj, sed tiu kutimo tute ne estas malutila al ili — la pli multaj estas sanaj, fortikaj kaj belkreskaj. La matenmanĝo konsistas el frititaj ovoj kaj ŝinko, aŭ frititaj kolbasetoj aŭ tranĉaĵo da bovaĵo aŭ bovaĵo kradrostita. Nur malmultaj, precipe en la urboj, manĝas avenkaĉon

aŭ avenbiskvitojn moligitajn per aldono de varma lakto aŭ buterŝmiritan rostpanon kun fruktaĵo. Lunĉo konsistas el diversspecaj sandviĉoj, laktuko, fruktoj, fromaĝo kaj teo. Sed vespere ĉiuj manĝas abunde rostitan viandon kun legomoj, supon kaj dolĉaĵojn.

Koncerne amuzojn oni devas distingi inter kamparo kaj urbetoj. En ĉefurboj oni trovas teatrojn kaj operetteatrojn, en kiuj lastaj oni tre ofte prezentas komponaĵojn de Gilbert kaj Sullivan, odorataj de ĉiuj anglorasanoj. Tre bonaj simfoniaj orkestroj ludas la plej bonajn klasikaĵojn.

Sed en pli malgrandaj urboj la kinoj estas la plej populara amuzo. Flanke de ĉi tiuj intelektaj amuzoj sportoj ludas grandan rolon en la amuzoj de la aŭstralianoj. Piedpilko, teniso, kriketo estas la ĉefaj. Inter la maljunuloj estas favorataj bulludo kaj kroketo.

Sed la nekontraŭstarebla reĝo de ĉiuj amuzoj estas ĉevalkonkursoj trote aŭ galope. La aŭstralianoj estas vetludantoj ĝisoste. Ili volonte oferas ĉiujn aliajn komfortojn de la vivo por partopreni vetludon ĉe kurejo. La pli malriĉaj, kiuj pro diversaj kaŭzoj ne povas iri al la kurejo, ofte kunvenas en tabakvendejoj, kie ekzistas telefona servo kunliganta kun la kurejo, kaj tie ili vetludas sen vidi la konkurson, nur sek-vante okscitite la telefonan komenton. Mi devas konsenti, ke ili estas bravaj vetludantoj; gajnante ili plezuras kaj celebras la bonŝancon per abunda trinkado; sed kum same senzorga indiferento ili adaptas sin al malfavora sorto.

La ĵus menciitan econ oni trovas en ĉiuj entreprenoj de la aŭstralianoj. Ili ne ŝatas la kutimajn okupojn, kiuj ne havas iom da risko en si, riskante ili ĝuas. Pro tio altiras ilin orserĉado, kiu estas vetluda formo de laboro. Same estas pri kulturado de terpomoj, ĉar ankaŭ tio estas tre necerta afero tie ĉi; iufoje oni povas multe gajni, alifoje oni perdas ĉion.

La okupoj, kiuj donas eblon de granda profito, logas la aŭstralianojn, ankaŭ se ĉiel danĝeraj. Ili estas kuraĝaj kaj eltenaj multe pli ol eŭropanoj. Mi memoras la impreson, kium mi ricevis antaŭ 20 jaroj, kiam mi venis al tiu ĉi lando kaj renkontis ŝafbrediston, kiu ŝerĉis helpanton. Li rakontis, ke li antaŭ kelkaj monatoj fariĝis malriĉa, kiam la ŝafoj mortis

pro manko de pluvo. La perdo estis 8000 funtoj, sed li tute rezignis sub la sorto kaj estis preta rekomenci la grimpadon supren al pli feliĉa stato. Al mi, kiu venis de la malnova kontinento, tia sinteno estis preskaŭ nekomprenebla, kaj mi emis kredi lin mensoganto, sed mi tute eraris. Ofte oni renkontas homojn, precipe en la orminaj distriktoj, kiuj alterne fariĝis riĉaj kaj malriĉaj du, tri fojojn dum la vivo. Aŭstralio estas por ĉiuj lando de revoj kaj aventuroj, lando de sukceso por fortaj obstinuloj, paradizo por vetludantoj. Eĉ lernantoj diskutante pri farota pilkoĵeto ekkrias unu al la alia: "Mi vetas kun vi, ke mia ĵeto gajnos!"

Esperanto en la telefontekniko

de AKE KÄELL

Inter la modernaj komunikiloj la telefono havas elstaran lokon. La homoj de nia epoko konsideras la telefonon necesa ilo en rapidema tempo, kaj tial ili havas grandajn postulojn pri rapida komuniko kaj bona sonkvalito. Por provado de sonkvalito de telefonkonektoj oni uzas esperanton pro ĝia internacie uzebla sonprovizo.

La internacia konsilanta telefonkomitato CCIT (Comité Consultatif International Téléphonique) faris rekomendojn, kiamaniere oni faru laboratoriajn provojn pri telefonaparatoj. La provojn plenumas malgranda nombro da personoj (4 ĝis 5), kiuj ĉiu sinsekve legas nombron da sensencaj silaboj, t. n. logatomoj, dum la aliaj aŭskultas kaj notas, kion ili perceptas. Tiu, kiu por la momento legas, estas en aparta ĉambro, kaj li parolas en la mikrofona de la provata aparato. Tiuj, kiuj por la momento aŭskultas, kolektiĝis en alia ĉambro kaj aŭskultas en aŭdiloj de aparatoj de la provata tipo. Post la provo oni komparas la skribitajn silabojn kun la legitaj silaboj, kaj la nombro da ĝuste perceptitaj silaboj kaj sonoj rilate al la

tuta nombro da silaboj kaj sonoj donas mezuron pri la logatoma kaj la sona perceptebleco.

CCIT rekomendas, ke la logatomoj estu kompilitaj el sonoj apartenantaj al esperanto. Kompleta tabelo estas farita pri la sonoj kaj sonkombinoj uzotaj. Ĉiu logatomo konsistas el tri sonoj, unu antaŭkonsonantsono, unu vokalsono kaj unu postkonsonantsono. Sekva listo montras la sonojn uzatajn en la esperantologatomoj.

Antaŭkonsonantsonoj (41): b bl br c ĉ d dr f fl fr ĝ g gl h j k kl kr l m n p pl pr ps rs sl sp st str ŝ ŝl ŝr ŝt t tr v vl z.

Vokalsonoj (5): a e i o u.

Postkonsonantsonoj (21): b c ĉ d f ft g k l m n ng p r rs s st ŝ t v z.

Do oni sin ligis al certaj sonkombinoj kaj tute evitis la sonojn ĥ ĵ kaj ŭ. Per la 41 antaŭkonsonantsonoj, la 5 vokalsonoj kaj la 21 postkonsonantsonoj oni ricevas 4305 kombinojn. CCIF pretigis tre grandan nombron da listoj, ĉiu enhavanta 50 logatomojn. Tia logatomlisto estas sube montrata.

1. tin	11. plaŝ	21. poz	31. net	41. ŝres
2. braŝ	12. ŝlaf	22. her	32. psuk	42. tem
3. stres	13. prust	23. nol	33. blirs	43. ŝtud
4. sars	14. reng	24. frat	34. jin	44. loft
5. trep	15. fluŝ	25. moz	35. ŝac	45. vis
6. rar	16. ŝim	26. drer	36. klok	46. ĝuf
7. glab	17. stoft	27. gov	37. vlug	47. slug
8. bun	18. cang	28. vil	38. kip	48. dib
9. lov	19. greĉ	29. kruĉ	39. sust	49. fom
10. mil	20. spac	30. zet	40. ĉop	50. biv

La listoj estas tiel ekvilibritaj ke la diversaj sonoj aperas kun sama nombro sur ĉiuj listoj. La antaŭkonsonantsonoj b l m n r s ŝ t kaj v aperas dufoje, ceteraj antaŭkonsonantsonoj nur unufoje. La vokalsonoj aperas dekfoje. La postkonsonantsonoj l m n r s ŝ t kaj v aperas trifoje, ceteraj postkonsonantsonoj dufoje.

Krom pri logatom- kaj sonperceptebleco oni parolas ankaŭ pri la zonperceptebleco. Se oni ekzemple en altkvalita interparolkonekto dividas la transportatan frekvencozonon en du partojn kiuj havas po la saman sonpercepteblecon, oni diras,

ke tiuj du partoj havas la zonpercepteblecon 0,5. La altkvalita konekto laŭ nia supozo transportas la tutan frekvencozonon de preskaŭ nulo ĝis preskaŭ infinito. Se oni fortranĉas ĉiujn frekvencojn super 1750 p/s aŭ ĉiujn frekvencojn sub tiu valoro, en ambaŭ kazoj oni ricevas la sonpercepteblecon 0,94. Por la tuta frekvencozono ni supozas la sonpercepteblecon 1,00. La zono 0—1750 p/s povas esti dividata en du partojn kun la sama sonperceptebleco, per kio oni ricevas du pli malgrandajn zonojn kun la zonperceptebleco 0,25. La limfrekvenco en tiu kazo estas 1050 p/s kaj la sonperceptebleco 0,82. La zono inter 1050 p/s kaj infinito havas la zonpercepteblecon 0,75 kaj la sonpercepteblecon 0,98.

Regas unusenca difinita rilato inter zonperceptebleco kaj sonperceptebleco. Por tiu rilato oni sukcesis starigi formulon, kiu krom certajn fiksjajn konstantojn enhavas konstanton, kiun decidias la sperto de la mezurgrupo. La fiksjaj konstantoj estas mezuritaj en laboratorioj sur diversaj lokoj en la mondo. En certaj kazoj oni ricevis kontentigan konformecon, en aliaj kazoj tamen gravajn diferencojn, pri kiuj oni devas suspekti, ke ili iom dependas de diferenca elparolo.

Tradukis Salex.

Kia estos la estonteco?*

De E. HULT

Antaŭdiri la estontecon ne apartenas al la pli facilaj problemoj. Nebula kaj duba ĝi ŝajnas. En la militfrontoj la flamoj de la milito ankoraŭ brulvundas la homojn. Ankoraŭ ne eblas antaŭdiri la finon de la terura kaj kruela fratomurdado, kiu jam postulis tiom da viktimoj kaj suferoj. Proksime de niaj landlimoj ni jam multfoje vidis okulfrapajn kaj kortuŝajn ekzemplojn pri la suferoj, kiujn devas travivi niaj gefratoj en la najbarlandoj. Granda nombro da rifuĝintoj jam rifuĝis en tiun pacan oazon, kiu estas ankoraŭ Svedujo. Al

* La art. estas verkita jam dum la milito.

tiuj niaj proksimuloj la estonteco ŝajnas eĉ pli nebula ol al ni, kiuj almenaŭ havis la feliĉon vivi en paca lando.

Kiom longe daŭros, antaŭ ol tiuj personoj havos okazon reveni al sia patrolando kaj rekonstrui tion, kion la malamiko detruis? Multe ne estas eĉ riparebla, ĉar kiel redoni al edzino mortigitan edzon aŭ al senpatraj infanoj ilian patron? Kiu helpas al tiuj bedaŭrindaj homoj krei novan ekziston kaj redoni al ili la kredon je nova pli bona estonteco? Kiu el la militantaj landoj unue prenos la iniciaton al paco? Ĉu ni vere ankoraŭ ne povas atendi la prudentiĝon de la erarvagintaj kunhomoj?

Malfacile estas respondi tiujn demandojn, ĉar pro la plurjara militado la koroj de la militantaj homoj ege malmoliĝis. Sen troigo oni povas aserti, ke la moralo ege malaltiĝis. Ne nur la moralo sed ankaŭ la kredo je la estonteco ne plu estas la sama kiel antaŭe. Kiom el ni ankoraŭ sukcesis konservi nian kredon je la realiĝo kaj kreado de nova mondo, kie ne ekzistos maljustaĵoj, sed kie ĉiuj homoj vivos feliĉe kaj ne bezonos suferi pro nesufiĉo de nutraĵoj? Ĉu ni ne rajtas dubi pri la realiĝo de tia socio?

Malgraŭ ĉiuj belaj promesoj donitaj post la antaŭa mondmilito la homoj denove estas pretaj ekstermi unu la alian. Vana estis la laboro de la pacorganizoj, vanaj ĉiuj klopodoj de idealistoj, kiuj dediĉis sian liberan tempon por altigi kaj plibonigi la vivnivelon de la homoj. Ŝajnas kvazaŭ la homoj montrus pli grandan intereson por armi kaj prepari sin por tria mondmilito. Se ni kredu ilin, la tuta produktovivo estas dependa de tio, ke ni produktas varojn, ĉu por la nuna milito, ĉu por iu nova, kiu nepre devos sekvi la nun reganta. Dank al la militoj kreiĝas laborokazoj, kiuj ne kreiĝas alie.

Kion diri pri tia aserto? Ĉu ne eblas funkciigi la maŝinojn por kontentigi la pacajn bezonojn? Ankaŭ paca produktado donos laboron al la homoj. Povas esti, ke tia produktado ne tiel rapide plenigas la monujon de la fabrikposedantoj, sed ĉu malgranda nombro da homoj pro profitamo rajtas malhelpi al ni krei tian mondon, kiun diktas al ni nia konscienco? Ĝis nun egoismo kaj propra profito direktis niajn agojn, sed ĉu ni en la estonteco ne permesu ankaŭ al niaj proksimuloj

dividi la gajnon? Ĉu la mondo ne estas tiom vasta, ke ĝi donas lokon kaj nutraĵon al ĉiu el ni? Sendube estas tiel, sed ni ne vidas la arbaron pro tro multaj arboj.

Anstataŭ aeroplanojn, bombmaŝinojn, kanonojn k. t. p. ni povus konstrui modernajn kaj komfortajn loĝejojn, malsanulejojn kaj laŭ la vera senco de la vorto altigi la vivnivelon. Kial tiom da homoj devas loĝi en domaĉoj, kie la vento vagas tra la muroj? Kial ne ĉiuj infanriĉaj familioj havu vastajn kaj komfortajn loĝejojn, kie la infanoj ne bezonos malsaniĝi pro malbona aero kaj malvarmo? La inventemo floris longtempe. Kial ni ne uzu ĝin por faciligi la laboron de homoj kaj bestoj? Ni faru ekskursojn al la kamparo kaj studu la tieajn vivkondiĉojn. Ĉu estas strange, ke la kampara junularo turnas la dorson al siaj vilaĝoj kaj gepatraj hejmoj kaj fuĝas al la grandurboj kun ĝiaj pli bonaj vivkondiĉoj? Ĉu ne tiu fuĝado estas klarigebla kaj natura? Tamen oni akre kritikis kaj juĝas la gejunulojn pro ilia emo forkuri de la ofte peza kaj malbone pagata laboro en la kamparo. Ĉu nur ni urbanoj havu regulitan labortempon kaj disponu pri laboriloj, kiuj multe faciligas nian laboron? Kial ne produkti kaj disponigi al ili maŝinojn, kiuj farus la plej pezan parton de ilia laboro? Neniu homo amas dediĉi sian tutan vivon al laboro por akiri sian porvivon. Ĉiu el ni deziras kaj bezonas tempon por iel amuziĝi. Ni uzu la inventitajn maŝinojn por ŝpari kaj faciligi la laboron de ĉiuj homoj, kaj ni uzu ilin ne por pligrandigi en plej mallonga tempo nian bankokonton. Kial envii al niaj proksimuloj tion, kion ni mem deziras de la vivo? Se mi mem deziras havi 8-horan labortempon ĉiutage aŭ 3-monatan libertempon ĉiujare, mi ne neu al mia proksimulo havi la saman eblecon. En la estonteco ni do provu dividi la laboron pli juste, kaj ni ne postulu, ke aliaj homoj vivu sub pli malbonaj kondiĉoj ol ni. Ne estas necese mortigi kaj suferigi aliajn homojn celante avantaĝon al ni. La mondo estas tiom vasta kaj riĉa, ke ni ĉiuj havas eblon kontentigi niajn bezonojn.

Koncerne la estontecon de Esperanto ankaŭ ĝi estas malfacile antaŭdirebla. Ankaŭ ĝi dependas de nia emo dividi laboron kaj komforton. Ĝis nun nur malgranda nombro da

aktivaj esperantistoj dediĉas sian liberan tempon por antaŭenigi kaj disvastigi la lingvon. Kiel atingi rapidan venkon de Esperanto, se ne ĉiu el ni alportas sian brikon? Ni ne nur postulu, ke la kunvenoj de la esperantogrupoj estu interesaj kaj sukcesaj, sed ni mcm faru ĉion por ebligi la estiĝon de tiaj kunvenoj. Ne eblas al iu antaŭdiri, kiam au kiel Esperanto venkos, sed pri io mi estas certa, nome ke la sukceso de la lingvo estas dependa de niaj propraj aktiveco kaj fideleco. Ni ne postulu interesajn kaj kontentigajn kunvenprogramojn ĉiam, se ni ne mem iufoje helpas la malmultajn laborĉevalojn de la grupoj.

En mia artikoleto pri la estonteco mi starigis grandan nombron da demandoj. Kiel vi volas respondi ilin? Ĉu mi eble tro pesimiste rigardas la estontecon kaj la homojn? Ĉu ni homoj estas pli bonaj ol nia famo kaj la estonteco pli serena ol mi pentris ĝin?

E. Hult.

Etoso

Fora kaj profunda estas la ĉielo.
Super mil lumetoj regas ora stelo.

Blanka kaj lulpala fluas lumrivero
al la nigraj kampoj de silenta tero.

Cedas la mallum' al orienta tago.
Brilas sunradi' — ĉielsendita sago.

Vekiĝintaj birdoj plaĉe murmuretas.
Frumatena vento tra l' arbar' kuretas,

plektras foliaron; la ondetoj plaŭdas.
Ĥore kaj adore ĉio Dion laŭdas.

Fink.

Rim. Etoso — proponita vorto por "atmosfera" de loko, medio.
Plekto — ileteto por sonigi kordojn de certaj instrumentoj.

Pensoj

La ĉiutagaj bagateloj, niaj malgrandaj personaj malfeliĉoj, impresas nin pli profunde ol grandaj katastrofoj, kiuj frapas tutajn popolojn. Same la iomo da feliĉo, kiun ni aspiras, estas al ni senfine pli kara ol la grandaj mirindaĵoj, kiuj donas lumon al la homaro. La gravita centro de la mondo estas nia "mi".

*

Forta homo ne estas tiu, kiu subpremas amasojn; forta estas tiu, kiu kondukas sian propran boaton tiel, ke ĝi ne renversiĝas. La pli bela triumfo estas la venko super si mem.

*

Se la vivo estas vojaĝo, la pejzaĝo de juneco estas la plej mirinda, kiun ni renkontas. Ĝi estas pejzaĝo de suno kaj senfina printempo.

Kiam ni forlasis ĝin, kaptas nin eterna nostalgio; ofte ni volus tien reiri, sed ni sentas, ke por ni ĝiaj limoj estas nepaseblaj kaj ke ĝiaj nunaj loĝantoj estas por ni fremduloj.

D. van der Stempel.

Literaturo

Folke Bernadotte: La fino
Eldona Societo Esperanto.
Prezo: Broŝurita 5,80 kr. Kartonita 6,80 kr.

Tradukis el la sveda Stellan Engholm.

Printempe 1945, kiam tiom gravaj ŝanĝoj okazis sur la militkampoj kaj paco fine venis al Eŭropo post preskaŭ sesjara militado, la sveda grafo Folke Bernadotte havis okazon en servo de la sveda Ruĝa kruco rigardi malantaŭ la kulisojn de la disfalanta Tria Regno. En sia libro "La Fino" li donas sinceran raporton pri siaj traktadoj kun Himmler

kaj aliaj naciistaj gvidantoj penantaj kiom eble plej longe konservi la iluzion, ke Germanio tamen venkos.

Dum la lasta tempo Hitler estis morte malsana kaj povis nenion iniciati, sed laŭ siaj frenezaj kapricoj li elĵetis ordonojn, kiujn liaj subuloj ne kuraĝis kontraŭstari. La vera potenco tamen dum kelka tempo estis en la manoj de Himmler, kaj lin Bernadotte ekkaptis por proponi hejmensendon de ĉiuj danaj kaj norvegaj internigitoj. Li fine sukcesis multe pli bone, ol li iam kuraĝis imagi. Sed krome liaj humanecaj traktadoj ankaŭ havis aliajn sekvojn, kiujn li ne antaŭvidis. Ni ja bone memoras la kapitulacproponon de Himmler, kiun B. peris.

La bildoj pri la plej gravaj naciistoj, kiujn B. prezentas, estas bonaj psikologiaj studoj. Oni ricevas imagon pri la afabla Gestapoĉefo Himmler, kiu tre interesis sin pri runskriboj. Sed se Himmler ŝajnis psikologia enigmo, kontraŭe la estro de la sekurpolico, Kaltenbrunner, estis sufiĉe klara tipo, reprezentanto de la "sinjorpopolo". La ministro por eksteraj aferoj, Ribbentrop, kun sia stulta kaj memama parolemo aperas kiel ridinda figuro kun malvasta animo. Nur unu el la naciistaj gvidantoj donas simpatian impreson, nome Schellenberg, estro de la politika sekcio de la informiĝoficejo. Li faris gravajn servojn al B. kaj sen lia helpo la tuta afero eble ne estus sukcesinta.

La stilo estas simpla kaj klara kiel ĉiam en la libroj de Engholm, kaj ni estu dankaj ke li ne tro ŝarĝas la lingvon per superfluaĵoj afiksoj. "Afablo", "la okcidentaliancaj gvidoj", "transloko" kaj similaj foje frapaj esprimoj unue pensigas, poste ĝojigas nin, ĉar la pli mallongaj vortoj faras la lingvon pli bela.

La enhavo estas interesa, la lingvo facila. Tial oni rapide tralegas la libron sen multa cerbumado pri la esprimoj. Poste oni relegas la libron pli atente. Mi asertas ke vi faros! La libro priskribas la finon de la Tria Regno de Hitler. La esperanta eldono signifas komencon de nova literatura klubo, kiu donas esperon pri nova prosperepoko de la sveda esperantomovado.

Salex.

*

Agostinho da Silva:

Lasta vojaĝo de Scott

La kastoroj

Vivo kaj morto de Sokrato

Piccard en la statusfero

Eldonis: Manuel de Freitas, Monte da Lapa, 49—1, Porto, Portugalujo. Peranto en Svedujo: Einar Adamson, Värmlandsgatan 18, Göteborg. Prezo por ekz. 0,50 sv. kr. inkl. sendkoston.

La supre menciitaj verkoj estas tradukoj el la portugala. Same kiel "La Arancoj", pli frue menciita en MR, ili ampleksas po ĉ. 20 negrandajn tekstopaĝojn. La enhavo laŭ amplekso kaj prezentado egalas al populara prelego aŭ tiaspeca gazet-aŭ revuartikolo. Por homoj, kiuj antaŭe ne konas la koncernajn temojn, ili certe estas interesaj kaj informaj. La lingvo havas kelkajn neglataĵojn kaj erarojn, tamen ne tiel, ke tio ĝenas la legadon.

*

Chr. Heilskov:

Hans Christian Andersen.

liaj vivo kaj verkoj

Ricevebla de la aŭtoro, Brabrand, Danujo, en Svedujo de Förlagsföreningen Esperanto, Box 19071, Stockholm. Sveda prezo 2,10 kr.

Tiu ĉi libro estas verkita kaj eldonita antaŭ la milito, sed la militeksplozo malhelpis informojn pri ĝi kaj ĝian disvastigon. Tiom pli grave estas, ke la esperantistoj nun ne pretervidas ĝin, ĉar ĝi tre meritas legadon. Ĝi ne estas ampleksa en komparo kun la grandaj libroj pri Andersen, verkitaj de fakuloj, kiuj troviĝas en la dana kaj la sveda. Tamen ĝi en sia konciza prezentmaniero certe donas ĉiujn gravajn kaj

necesajn faktojn, kiuj troviĝas en la grandaj libroj, kaj ankaŭ kelkajn el la flankaj. La materialo estas bonege aranĝita. Malgraŭ la koncizo la libro nenie similas al seka literaturhistorio. Ĝi ĉiam estas plenviva, streĉe kaj kortuŝe interesa. Ĉiuj ne scias, ke la vivo de Andersen estis fabelo same belkomponita kaj profundsenca kiel la plej bonaj fabeloj, kiujn li mem verkis. Tiu ĉi libro konatigas ĝin al vi. La lingvo estas tre bona. Mi rekomendas la libron. Ĝi donos al vi ĝojon kaj spiritan profiton, egale ĉu vi havas specialan literaturan intereson aŭ ne.

S. E.

MALGRANDA REVUO aperas kvaronjare. Prezo 1 kr. (inkl. sendkoston), je mendo de minimume 10 ekz. po 0,80 kr. Abono akceptata. Redaktoro-eldonanto: Stellan Engholm, Skolgatan 9, Ludvika. Poŝtĉeka konto 26 80 23.